

# Esperanto-Brno

*Esperanto-Brno - Kluba prelego 21.1.2013*

## **Ordinara homo ... (Obyčejný člověk)**

*Oldřich Arnošt Fischer*

### **Antaŭparolo**

Eldonante tiun broŝureton ni volas proksimigi al leganto elstarulon de la urbo *Přibyslav*. Kiu estis *Jan Filip*? Kial oni nomigis unu de stratoj de *Přibyslav* laŭ li? Pro kio li estis aŭ eĉ nuntempe estas tiel signifa?

En la centa datreveno de lia naskiĝo ni decidis plenumi tiun blankan lokon. Ni estas tre dankeman al geedzoj *Janáček*, kiuj kun amo zorgas pri ĉiuj suveniroj je *Jan Filip* kaj kiuj al ni neprofiteme pruntedonis dokumentojn kaj fotografaĵojn de ilia privata arĥivo.

### **Ordinara homo**

*Jan Filip* naskiĝis en la urbo *Přibyslav* la 9-an de decembro 1911 en dometo kun numero 74/II. Oni nuntempe jam ne povas trovi tiun dometon en la strato *Hesovská*, kie ĝi staris, ĉar ĝin anstataŭis nova vileto kun numero 204.

Kiam *Jan* naskiĝis, lin ne bonvenigis ora lulilo, sed amo de liaj gepatroj *František Filip* kaj *Františka*, naskita *Vlčková*, kiu devenis de la vilaĝo *Špinov*. *Jan* havis kvar pli aĝajn gefratojn: du fratojn, *Václav* kaj *František*, kaj du fratinojn, *Karla* kaj *Marie*. Post kvar jaroj ekde naskiĝo de *Jan*, multenombra familio plimultiĝis, ĉar naskiĝis ankoraŭ frato *Karel*. Ilia patro estis teksisto kaj ilia patrino kromlukris plej ofte kiel agrokulturistino. La *Filipoj* havis hejme malmulte da mono, sed multe da konkordo, amo kaj forta, sincera pieco.

### **Jaroj de lernado en lernejo**

*Jan* ekfrekventis bazlernejon en *Přibyslav* en septembro 1917. De tiu tempo, el la jaro 1919, konserviĝis dokumento, ke sepjara Janĉjo donacis unu arĝentan moneron en tiaman kolektaĵon por ora trezoro de Ĉeĥoslovaka Respubliko.

Sentema, pensema kaj lernema knabo jam kiel malgranda havis eksterordinaran eblecon klare esprimi siajn pensojn kaj sentojn voĉe kaj pli poste ankaŭ skribe. Krom lia familio, en kiu li kreskis, forte influis evoluon de lia infana animo ne nur instruistoj de lernejo de *Přibyslav*, sed precipe tiama loka pastro, dekano *Alfons Hronek*, dum kies diservoj en loka preĝejo malgranda *Jan* multfoje funkciis kiel akolito. Povas esti, ke jam tiam la knabo ekdecidis fariĝi pastro kaj servi tiamaniere al la Dio kaj homaro kiel pastro kaj instruisto.

Kvankam baldaŭ aperis lia eksterordinara talento por studado, lia familio ne estis sufiĉe riĉa por subteni multekostan studadon de sia filo. Spite de lia talento kaj grandaj sukcesoj en lernejo oni decidis, ke li finos devigan vizitadon de urbana lernejo kaj tuj poste li ellernos iun eblan metion.

Dank' al loka pastro *Alfons Hornek* oni solvis tiun problemon. La pastro proponis al gepatroj, ke se *Jan* sukcesos en enira ekzameno por Ĉefepiskopa gimnazio, lian pluan studadon oni povos subteni de stabila financa kontribuado el ekleziaj kaj sekularaj fontoj. Supozeble la pastro, kiu majstris krom la ĉeĥa kaj latina lingvoj ankaŭ la germanan, anglan kaj francan lingvojn, proponis tion pro intereso de la knabo pri fremdaj lingvoj. Eble ĝuste li estis homo, kiu al naŭjara *Jan* unuafoje konigis esperanton – lingvon, kiu tiam estis konsiderita perspektiva, universala, kiel lingvo por interkompreniĝado de homoj en la tuta mondo. Ni nun malfacile povas trovi, se tio estas vero. Sed laŭ realo *Jan Filip* dediĉis sin al esperanto dum sia tuta vivo kaj en sia tempo li fariĝis unu de la plej signifaj ĉeĥoslovakaj lingvistoj, kiuj koncentriĝis ĝuste al esperanto.

## Studado

*Jan* jam antaŭ fino de sia frekventado de lernejo en *Přibyslav* faris eniran ekzamenon por Ĉefepiskopa gimnazio en Prago-*Bubeneč*, kie oni akceptis ankaŭ laikojn. Tial aŭtune en la jaro 1923 foriris dekdujara knabo el sia naska *Přibyslav* en Pragon, kie li eĉ ekde la unua instruaro sukcese studadis kaj en la jaro 1931 eĉ honore menciita trapasis abiturientan ekzamenon.

Jam dum sia okjara mezlerneja studado li manifestiĝis kiel preta poeto, rakontisto kaj raportisto de ĵurnalo *Zprávy z Bubence* (Novaĵoj de *Bubeneč*). Spite de tio lia ĉefa intereso restis esperanto. Nekredeble, ke li jam dektrijara komencis kompili de vorto al vorto Grandan esperantan-ĉeĥan kaj ĉeĥan-esperantan vortaron, kiun li finis ankoraŭ antaŭ sia abiturienta ekzameno. Tiun lian kvarcentpaĝan verkon eldonis en grandega eldonkvanto Societa printejo en *Přerov* en la jaro 1930. Dum tre mallonga tempo tuta eldonkvanto estis disvendita kaj tio eldevigis la duan kaj pli poste eĉ la trian eldonadojn. En *tiu sukceso nemal multe partumis lia pli juna frato Karel, kiu dank' al pastro Alfons Hornek, favoranto de filoj de Filipinoj, aŭtune ekstudis en la sama gimnazio en Prago en la jaro 1927.*

Dekkvarjara *Jan* ekde la jaro 1925 redaktis regulajn esperantistajn rubrikojn de ĵurnaloj *Květy mládí* (Floroj de juneco) kaj *Nový národ* (Nova nacio). Legantoj de *Nový národ* sciis lin ankaŭ kiel redaktoro de literatura-arta rubriko *Zábavná beseda* (Amuza societo) kaj sprita enigmisto.

Ekde sia juneco li vige esperantlingve korespondis kun multe da eksterlandaj samideanoj. Por pli preciza ilustrado de lia ŝatokupo de esperanto povas sufiĉi informo, ke li multe da jaroj redaktadis kurson de tiu lingvo ankaŭ en ĵurnalo *Vpřed* (Antaŭen), kie li siajn artikolojn subskribis uzante sian skoltan nomon *Stepní vlk* (Stepa lupo).

Internacia Esperantista-Asocio organizis konkurson pri la plej bela poemo pri Virgulino Maria en la dudekaj jaroj de la dudeka jarcento. La unua premio de tiu konkurso estis intence nur simbola – bukedo de blankaj rozoj, kiun venkonto de la konkurso devos meti al piedoj de statuo de Virgulino Maria en Lurdoj. Esperdona poeta komencanto el Bohemia-Moravia Montetaro venkis en tiu konkurso, sed ne povis forveturi en Lurdojn. Lernejestraro ne liberigis lin de lernado kaj tial menciitan bukedon anstataŭ li metis al statuo de la Patrino de la Dio du reprezentantoj de klubo de katolikaj esperantistoj.

Dekokjara *Jan* fariĝis la plej granda stelo de la ĉeĥoslovaka esperantista firmamento, sed tio ne malbone influis liajn rezultojn de gimnazia studado. Laboro por la vortaro plene ne forĉerpis liajn lingvaj kaj aliajn aktivecojn. Li verkis ankaŭ esperantistan kantareton Kantareto, kiu enhavis esperantigitajn popolajn kaj religiajn kantojn kaj estis eldonita en la jaro 1929. Elnombro de liaj esperantlingvaj verkaĵoj, kiuj en tiu tempo aperadis en diversaj ĵurnaloj, estis tiel vasta, ke nuntempe estas nereale ilin komplete listigi. Sed ni

devas denove rimarkigi, ke li ofte sukcesis en literaturo kaj lingvistiko ankaŭ merite de sia frato *Karel*. Dank' al lia helpo estis verkitaj kelkaj interesaj teatraĵoj kaj poemaroj.

Post sia abiturienta ekzameno *Jan* ekstudis en Episkopa seminario en *Hradec Králové*. Post nefacila sed sukcesa studado li estis dum festo de Sanktaj Petro kaj Paŭlo la 29-an de junio 1936 ordinaciita kiel sacerdoto. Kaj tuj en venonta dimanĉo post ordinacio, en la festo de Sanktaj Cirilo kaj Metodo, la 5-an de julio 1936, juna nova pastro celebris sian unuan sanktan meson.

## Verkado

Tuta kvinjara studado de *Jan* en seminario en *Hradec Králové* estis plenumita de ne nur intensa preparado por estonta pastra misio, sed ankaŭ de abundaj lingvistika kaj literatura agadoj. Dum sia studado li krom esperanto ekposedis ankaŭ kelkajn aliajn fremdajn lingvojn – latinan, grekan, germanan kaj anglan lingvojn. En sekvantaj jaroj al ili por studadaj kialoj plimultiĝis ankoraŭ aliaj fremdaj lingvoj. Dank' al tiuj lingvaj scipovoj li sentime povis ektraduki. Li tradukis plurajn siajn poemojn, rakontojn kaj teatraĵojn. En sian favoratan esperanton li tradukis teatrajn dramojn de aliaj aŭtoroj. Al ili apartenis ekzemple radia teatraĵo *Betlém* (Betlehemo) de *M. Kareš* kun muziko, kiun komponis *J. Křička*. Tiu enscenigo estis kelkfoje elsendita de Ĉeĥolovaka Radio. Ĉefan rolon ludis unu de niaj plej famaj aktoroj *Karel Höger*.

Vasteco de verkado de *Filip* estas mirinda. Li verkis ne nur poemojn kaj rakontojn, sed fariĝis fama ankaŭ kiel aŭtoro de teatraĵoj kaj radiaj ludoj. Iam ili eĉ estis luditaj tuj post ilia finpretigo kaj en tio partoprenis elstaruloj de tiamaj muzika kaj drama vivoj.

Dank' al sia lingvistika verkaro *Jan Filip* fariĝis tiel konata en Eŭropo, ke li estis invitita al diversaj internaciaj esperantistaj agadoj. En julio kaj aŭgusto 1947 li faris prelegan rondvojaĝon trans Granda Britio kaj Irlando, kien li estis invita laŭ rekomendo de ministerio de eksteraj aferoj, kies estro tiam estis ministro *Jan Masaryk*, kaj ministerio de informoj, kiun gvidis *Václav Kopecký*. En Granda Britio kaj Irlando li uzante esperanton kaj anglan lingvon proksimigis al aŭskultantoj historion, vivon kaj kulturon de Ĉeĥoslovakio. Dufoje li plenumis la saman devon en Nederlando kaj Belgio. Pro tio li estis laŭdita de niaj ŝtataj oficoj. Liaj prelegoj estis altiraj kaj li projekciis laŭtemajn filmojn.

## Pastro kaj pedagogo

Pastro *Jan Filip* ŝarĝiĝis per ŝarĝo de sia paŝtista misio kaj tiun ŝarĝon li pacience portis dum tuta sia vivo. Post sia ordinacio en *Hradec Králové* kaj sia unua sankta meso en Příbyslav li laboris unu jaron kiel paroĥpastro en *Jičín*, poste li netutan jaron laboris kiel administranto de paroĥejo en *Nová Ves* super *Popelka*. Pli poste li estis nomumita kiel paroĥpastro en Kutná Hora. Tie li restis ses jarojn kiel profesoro de loka gimnazio kaj samtempe li instruis ankaŭ en loka pedagogia lernejo. Kiam li forlasis la urbon *Kutná Hora*, li eklaboris en gimnazio en *Dvůr Králové*. Sian profesoran praktikon li kontinuigis ankaŭ en lernejo en *Jičín* kaj tri jarojn en *Náchod*. Lia aproboj estis religio, historio kaj latino.

Dum sia laboro en lernejoj li latinigis plurajn popolajn kantojn kaj tiel plifaciligis studadon de la latina lingvo al studentoj. Li ankaŭ kapablis tre rapidspite kaj trafte verki akompanajn tekstojn por lernejanaj prezentadoj, ĥoraj deklamadoj kaj teatraĵoj de siaj studentoj. Li multfoje surprizis homojn en sia proksimeco per spritaj kaj trafaj tekstoj okaze de diversaj vivjubileoj de elstaruloj aŭ okaze de signifaj datrevenoj de ekleziaj aŭ civitanaj eventoj.

Liaj rilatoj al homoj, kun kiuj li renkontiĝis kiel pastro, profesoro, verkisto, poeto aŭ lingvisto, estis ĉiam respektplenaj, afablaj, honestaj kaj taktplenaj. Tial plimulto da homoj respektis kaj ŝatis lin.

Sed nur dekunu jarojn oni al li permesis aktive partopreni kiel gimnazia profesoro en edukado de junularo. Alvenis jaro 1950 akompanita de persekutado de personoj, kiuj estis maloportunaj al la reĝimo, kiel instalo de „venka registraro de laboristoj kaj agrokulturistoj“. Por *Jan Filip* tio signifis malpermeson de lia pedagoga agado. Tiam li ricevis ŝtatan aprobon „nur“ por laboro en eklezia administrantaro.

Eble estis almenaŭ malgranda konsolo por pastro *Jan Filip*, ke li povis por kvin jaroj reveni en sian naskurbo kaj servi en paroĥejo de *Přibyslav* al siaj proksimuloj kaj ĉiuj kredantoj kiel administratoro.

Li alvenis en malplenan pastran domon la 1-an de oktobro 1950. Tio estis en tempo post arestigo de pastro *František Halík* kaj rekrutigo de du novaj pastroj *Jan Mokřý* kaj *Josef Mokřý* al arma servo en Helpaj teĥnikaj batalionoj. Bedaŭrinde tiam komenciĝis lia kontraŭvola migrado tra diversaj paroĥoj. Kvar tagoj post fama pilgrimo en *Přibyslav*, la 30-an de junio 1955 li devis adiaŭi kun loka paroĥo, ĉar li estis translokigita en la vilaĝon *Veliš*. Tie li „restis“ nur kvar monatojn kaj jam estis forsendita en la vilaĝon *Chleny*, kiu situas proksime de *Kostelec* super *Orlice*, kie li en preĝejo de Sankta Apolinaro laboris kvar jarojn. Poste li translokiĝis en la vilaĝon *Letohrad* por kvar jaroj kaj poste naŭ jaroj de administratora servo en *Kratonohy*, en la regiono *Hradec Králové*.

## **Aprezo**

*Jan Filip* estis tiom signifa kaj konata elstarulo ne nur en nia lando, sed ankaŭ eksterlande, ke oni ne povis denove kaj denove prokrasti lian teologan doktoriĝon (por titolo *ThDr.*, doktoro de teologio, latine: *theologiae doctor*). Sed tio okazis en *Litoměřice* nur en la jaro 1963. Eble tio estis ankaŭ ia malfrua rekono de liaj teologiaj, pedagogaj, sciencaj kaj artaj meritoj.

Eminenta svisa esperantistino kaj tradukistino *Madlen Welsh* vizitis lin en lia pastra domo en *Kratonohy* en la jaro 1968. Ŝi volis persone ekscii elstaran eŭropan esperantiston kaj aŭtoron de Granda esperanta-ĉeĥa, ĉeĥa-esperanta vortaro kaj aliaj verkaĵoj. En tiu tempo estis eldonitaj kaj luditaj en teatroj du teatraĵoj de *Filip: Věž v oblacích* (Turo en nuboj) kaj *Konec světa* (Fino de la mondo).

## **Li trovis sian forton en sia pieco**

Estas mirinde, ke unu homo sukcesis krei tian vastan kaj diversspecan verkaron dum sia relative mallonga vivo, se li estis laŭ decidoj tiamaj ŝtataj ekzekutivoj multfoje translokigita el unu paroĥejo en alian paroĥejon. Se ni konsideras ĉiujn liajn menciitajn agadlokojn, ni devas demandi, kie li prenis tempon, sed precipe forton por sia krea laboro. Nepre lin plifortigis ne nur lia pastra devo, lia pieco, sed precipe estimo al la Patrino de la Dio.

Multe da liaj poemoj kaj kelkaj mesaj kantoj estis dediĉitaj ĝuste al la Virgulino Maria kaj estas kantataj ĝis hodiaŭ. Sed tio estis ne nur marianaj kantoj, ekzemple *K Panně Marii, Královně srdcí* (Al la Virgulino Maria, Reĝino de koroj), kiujn li komponis. Hazarde ni menciuj komponaĵon *Milostnému Pražskému Jezulátku* (Por Ama Jesu-Infano de Praga) aŭ kanton pri Sankta Jozefo, kiu havas nomon *Dělníku Boží* (Laboristo de la Dio) kaj kiun muzikigis *Jaroslav Křička*.

La tutan vivon de pastro Jan Filip plenumis senoferema laboro por liaj proksimuloj. Malgraŭ ke li travivis multe da momentoj plenigitaj per suferoj, abnegacioj, maldankemoj kaj seniluziigoj, liaj tagoj estis daŭre trariligitaj per rememoroj pri lia ĝoja infaneco. Lumturo kaj lumo fariĝis por li lia patrino, kiun li sincere amis. Simpleco de infana koro en li enradikis por lia tuta vivo.

La dua helpantino, ĉe kiu li ĉiam serĉis sekurejon, estis la Virgulino Maria. Ŝian ŝirmadon li petis en siaj preĝoj en siaj plej malbonaj tempoj, al ŝi li dankis por siaj sukcesoj kaj etaj eroj de sia ĝojo. Li ankaŭ dediĉis al la Patrino de Dio tutajn urbojn – *Kutná Hora*, *Čáslav* kaj *Červené Janovice*. Kiam li laboris en la 50-aj jaroj kiel pastro en *Přibyslav*, li por honoro kaj laŭdo de la Virgulino Maria ordonis kovri per oro ŝian statuon super ĉefa eniro de paroĥa preĝejo.

### **Mi jam sufiĉe laboris ...**

Pastro *Jan Filip* finis sian vivan iradon en festo de la Jesuo Kristo la Reĝo dimanĉe la 21-an de novembro 1971. Li preparis sin por celebrado de la sankta meso, kiel ĉiutage. Morto atingis lin en sakristio de preĝejo de Sankta Jakobo la Pli Aĝa en *Kratonohy*, kiam li vestiĝis en mesrobon. Tio estis nur 18 tagoj antaŭ lia 60-a naskiĝtago, kiun li solenus la 9-an de decembro. En ĵaŭdo la 25-an de novembro 1971 matene ĉiuj paroĥanoj de *Kratonohy* kaj vasta ĉirkaŭaĵo adiaŭis lin. Poste li estis, laŭ sia deziro, transveturigita en *Přibyslav-on*, kie je la unu kaj duono de horo posttagmeze okazis sepulto, kaj post ekleziaj funebraj ceremonioj li estis entombigita en loka tombejo. Estis pluvmalvarma novembra tago, ĉie kuŝis multe da neĝo, sed spite de tio lin dum lia lasta vojo akompanis multe da amikoj, konatuloj, kredantoj, elstaruloj de eklezia kaj civitana vivoj. Vane tiamaj komunistaj oficoj intence decidis, ke la entombigo devis okazi posstagmeze en labortago. Ĉiuj, kiuj lin konis, volis esprimi al li siajn estimon, rekonon kaj dankon por liaj tutvivaj moralaj vidpunktoj kaj lingvistika kaj literatura verkado.

En novembro 2011 pasis 40 jaroj ekde la tago, kiam pastro *ThDr. Jan Filip* mortis antaŭ sia 60-a naskiĝtago, ĉar en decembro 2011 li solenus sian centan naskiĝtagon. Lia verko influas ĉiun, kiu havas ŝancon ekscii lian postlasaĵon.

Se vi nuntempe volas trovi lian tombon, vi ne povas preterpasi lin en loka tombejo. La tombo situas en supra parto de malnova tombejo kaj estas ornamita de blanka statuo de la Virgulino Maria, kiun persone donacis belgiaj esperantistoj. En Belgio oni nomas tiun statuon la Sankta Virgulino de Spritmankaj.

### **Epilogo**

Kompiladon de kompleta kaj detala listo de la tuta literatura verkaro de ThDr. Jan Filip grandmezure malfaciligas fakto, ke li kelkajn siajn verkaĵojn publikigis uzante diversajn pseŭdomojn. En junulara ĵurnalo *Vpřed* (Antaŭen) li uzadis skoltan nomon *Stepní vlk* (Stepa lupo). Multe da poemoj kaj rakontoj li subskribis kiel *Václav Vlček*, *Václav M. Vlček* aŭ nur *V.M. Vlček*. Li tial esprimis sian amon al sia patrino, kiu havis fraŭlinan nomon *Vlčková*. Nomon *Václav* (Venceslao) li uzadis kiel memoron pri sia forpasinta frato.

El pli ol dek teatraĵoj, kiuj estis en la jaroj 1933 – 1934 enscenigitaj en kelkaj urboj de nia respubliko, ni memoras tiujn:

<b>Nomo de teatraĵo</b>	<b>Jaro de premiero</b>	<b>Loko de premiero</b>
<i>Řím</i> (Romo)	1933	Urba teatro en <i>Hradec Králové</i>
<i>Slib</i> (Promeso)	?	?
<i>Olin hledá své srdce</i> (Olin serĉas sian koron) – radia ludo	?	?
<i>Konec světa</i> (Fino de la mondo) – kun sceneja muziko de <i>J.B. Foerster</i>	1934	Teatro en Prago en <i>Slup</i>
<i>Křížek na čele</i> (Kruceto sur la frunto)	?	?
<i>U brány milosrdných</i> (Ĉe la pordego de bonfaremuloj)	?	?
<i>Sestra Anunciata</i> (Fratino Anunciata)	1937	Urba teatro en <i>Pardubice</i>
<i>Bělička pro pana profesora</i> (Blankfiŝeto por la sinjoro profesoro) - komedio	?	?
<i>Bílý člun</i> (Blanka boato)	1943	Urba teatro en <i>Kutná Hora</i>
<i>Matka nejlepší</i> (La plej bona patrino)	?	?
<i>Ztracená</i> (Perdita) – kun muzikaj kontribuoj de profesoro <i>E. Hradecký</i> )	1944	Urba teatro en <i>Náchod</i>
<i>Věž v oblacích</i> (La turo inter nuboj) - versita dramo pri vivo de Sankta Barbora	?	?

En nia urbo *Přibyslav*, en eksa Katolika domo – Akvilejo lokaj teatraĵaj amatoroj ludis du teatraĵojn de *Filip*: *Konec světa* (Fino de la mondo) kaj *Bělička pro pana profesora* (Blankfiŝeto por la sinjoro profesoro). Unuiĝo de teatraĵaj amatoroj *Přibyslav* prezentis en hotelo *Klusáček* teatraĵon *Řím* (Romo) en la jaro 1933 kaj dum Kristnasko en la jaro 1943 en Falkejo teatraĵon de fratoj *Jan* kaj *Karel Filip Bílý člun* (Blanka boato). Enira kanto de lia teatraĵo *Ztracená* (Perdita) estas kvazaŭ antaŭsento de fatala futuro.

Krom teatraĵoj oni scias pri jenaj liaj prozaj verkoj:

Du libroj *Květy mládí* (Floroj de juneco) kaj *Za vznešeným cílem* (Al majesta celo) estas kunigitaj kun vivo en la naska *Přibyslav*. El rakontoj estas menciindaj *U Jezulátka* (Ĉe Jesu-infano), *Živé květy* (Vivantaj floroj), *Obrázek na stromě* (Bildeto sur arbo), *Zapomenuté slovo* (Forgesita vorto), *Orion* (Oriono) kaj *Tři zkrřížené meče* (Tri krucigitaj glavoj). Pri valoro de rakontista talento atestas fakto, ke kelkaj aliaj aŭtoroj tradukis liajn verkaĵojn en kelkajn fremdajn lingvojn – la nederlanda kaj slovaka lingvoj kaj kompreneble en esperanton.

Poeta verkaĵo estis kolektita en kvar kolektoj:

*Pomněnka* (Neforgesumino), *Chrám* (Templo), *Bílá slova* (Blankaj vortoj), *Cestou domů* (Survoje hejmen). Sed tiuj kolektoj ne enhavas nur poemojn. Multe da poemoj estis publikitaj en diversaj antaŭmilitaj ĵurnaloj aŭ konserviĝis nur en manuskriptoj.